

Ne konfuzi ununombrojn kun multnombro. Leterkesto 3.
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI ..., 1991.07.18 & 20

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée GACOND nome de Svisa Radio Internacia. En nia leterkesto kuŝas multaj korespondaĵoj. Laŭ la alfabeto de la familiaj nomoj ni daŭrigas nian perondan respondon.

A.- Saluton al Sydney FOK en Girton apud Cambridge, Britio, al Will GREEN, kies adreson ni perdis. Verŝajne ĝi troviĝis sur la leterkoverto, kiu ne atingis nin. La skribantoj sciu, ke iliajn mesaĝojn tralegos sufiĉe multe da radio-funkciuloj, antaŭ ol ili alvenos en nian leterkeston. Ekzemple ili estas prizorgataj de la pristatistikaj servoj. Tial ni antaŭdankas, se ĉiu remetas sian kompletan adreson sur ĉiu letero aŭ poŝtkarto.

Cl.- Saluton al Manfred HANSCHKE en Berlin, Germanio, al Stefan HLIWA en Kozuchow, Pollando, al L. HORDIJK en Vlaardingen, Nederlando, al Werner HOSTETTLER en Goldau, Svislando, al Sergej JAKOVLEV en Tuluskaja Obl., Sovetio, al Otto KACZINSKI en Havelberg, Germanio, al Karl-Heinz KERSTING en Essen, Germanio, al Karel KOPECKY en Trebechovice p. Or., Ĉeĥoslovakio kaj al Jan KOZŁOWSKI en Lwówek, Pollando.

A.- Igorj KRIVČONOK en Leningrado, Sovet-Unio skribis:

Cl.- "Esperanto estas ja ne celo, sed rimedo. Ĝi estas nur lingvo kaj nenio pli. Do via tasko estas, laŭ mia opinio, komenti la eventojn okazantajn en la mondo. Ekzemple nuntempe furiozas milito en la Persa Golfo, Sovet-Unio staras sur la sojlo de intercivilita milito. Kaj anstataŭ speguli ĉi-tiujn gravajn eventojn, vi legas scienc-fikcion..."

A.- Verŝajne multaj geaŭdantoj neakceptas tiun aserton, ke Esperanto estas nura rimedo kaj ke pro tio niaj elsendoj devus limiĝi al komento de militaj konfliktoj. Kun la plimulto de la esperantistoj ni opinias, ke esperanto estas ne nur lingva rimedo, sed ankaŭ movado kaj kultura fenomeno tutmonda.

Cl.- Esperanto disponas ĉe Svisa Radio Internacia nur po 3 dekminutajn elsendojn semajne. Tio ne sufiĉas por prezenti raportojn pri politikaj aktualaĵoj. Ni nur povus resumi, kion nacilingvaj redakcioj anoncis la antaŭajn tagojn. Tial ekde la lanĉo de la esperanto-programo en 1947 la koncernaj redaktoroj decidis distanciĝi de la politikaj aktualaĵoj por koncentri sian atenton super faktoj, kiujn la nacilingvaj elsendoj tendencas neglekti. Tio donas originalan karakteron al niaj esperanto-elsendoj.

A.- Ni provas reagi al la eventoj kiel homoj samtempe svisaj kaj homaranaj. Kaj ni esperas, ke tio instigas niajn aŭskultantojn same kultivi duoblan civitanekon. Ĉiu kreu en si ekvilibron inter du apartenoj, tiu al la propra etno aŭ nacio kaj tiu al la tuta mondo, al la homaro.

Cl.- Fakte malmultaj homoj provas pensi homarane, tio estas kiel civitanoj de la homaro. Kaj estas pro tio, ke la inter-etna kunvivado estas tiel malfacila. Ĉiu identiĝas antaŭ ĉio al la propra etno kaj malfacile akceptas, ke aliaj etnoj estu egalrajtaj en la sama ŝtato. Por la plimulto de la irakanoj, de la irananoj kaj de la turkoj ne estas loko por la kurdoj en iliaj repriprokaj ŝtatoj. Ĉiu identigas la propran ŝtaton kun la propra lingvo kaj ĝenerale rifuzas kunekziston al la aliaj etnoj, kiuj estas pro tio kondamnitaj ĉu al kontraŭstaro, ĉu al perejo. Israelanoj kaj paŝtinoj sin reciproke ekskludas. Kiam en la soveta imperio, en Jugoslavio

aŭ en aliaj ŝtatoj la komunisma premado malfortiĝas, tiam renaskiĝas la etnaj antagonismoj. Ni opinias, ke nia rolo ne estas priskribi la konfliktojn, kiujn tiuj antagonismoj naskas aŭ renaskas. La konfliktoj mem estas fakte efemeraĵoj. Ĝam nun la gazetoj, radioj kaj televid-stacioj ekforĝegas la Golfan Konflikton por raporti pri aliaj internaciaj dramoj, ĝenerale sen provi komprenigi la kaŭzojn de tiuj katastrofoj.

A.- Ni opinias pli utile konservi neŭtralan objektivecon, esplorante pri la kaŭzoj de tiuj konfliktoj interhomaj kaj internaciaj. Ni raportu pri ĉio, kio povas unuigi la homojn kaj konsciigi ilin, ke ili estas anoj de unu sola homaro, ĉar ni parolas al esperantistoj.

Cl.- En la konkluda ĉapitro al sia verko "Interpopola Konduto" Edmond PRIVAT, unu el la fondintoj de la esperanto-programo de Svisa Radio Internacia, prave skribis: "La plej grava kulpo de la ŝtataj moralistoj kaj pastraroj estis erara konfuzo inter ununombro kaj multnombro. Ne ekzistas nur unu patrujo, mia patrujo, la patrujo, sed multaj patrujoj, niaj patrujoj, la patrujaro. Tute same en nia lando ne estas nur mi, sed ni."

A.- La svisoj festas ĉijare la sepcentan naskiĝaron de sia konfederacio. Laŭ ni la plej granda kontribuo, kiun Svislando alportas al la mondo, estas la demonstro, ke nacio povas esti plur-etna, kaj ke ŝtato kaj nacio estas du malsimilaj nocioj. Nuntempe Svislando estas federacio de 26 ŝtatoj. Tiu nacio estas do ŝtataro. Kaj la nocio mem de svisa nacieco variis tra la tempo. Nur ekde la fondo de la moderna Svisa Federacio en 1848 povis konkretiĝi ĉe la loĝantoj la sento de aparteno al komuna nacio superŝtata, la nocio mem de svisa nacio, kiun konkretigas nek lingvo, nek religio, sed kelkaj komunaj defendaj reagoj kaj antaŭ ĉio pasporto, mono kaj jura sistemo.

Cl.- Rigardante al Eŭropo, kiu organiziĝas, ni konstatas fenomenojn, kiujn Svislando travivis. Ne ekzistas eŭropa nacio, kiel antaŭ du jarcentoj ne ekzistis svisa nacio. Eŭropo estas pli ideo, ol reala fakto. Same estis por Svislando. Iom post iom la espero Eŭropo tamen konkretiĝas en juraj realaĵoj pli kaj pli efikaj kaj altiraj. Multaj ŝtatoj ŝatus aliĝi al la Eŭropa Komunumo, inkluzive de Svislando. Ni sentas, ke eŭropa federacio formiĝas iom post iom, kaj ke baldaŭ komuna mono kaj komunaj superŝtataj institucioj kondukos al la nocio de eŭropa nacio, kiu fariĝos pli kaj pli konkreta.

A.- Niaj nepoj eble malfacile komprenos, ke en la dudeka jarcento franco, germano, dano kaj kroato havis horizonton limigitan al la propra malvasta ŝtato, kiun ili nomis nacio, kaj ke por ili Eŭropo estis nura utopiaĵo. Same svisa infano nun miras, ke antaŭ unu jarcento ĝenevano, bernano, tiĉinano kaj grizonano limigis sian patruj-amon al Ĝenevo, Berno, Tiĉino kaj Grizono, ke por ili la vorto Svislando eĉ vekis kontraŭstaron kaj malamajn reagojn.

Cl.- Ĉio evoluas, kaj ni provu esti la pioniroj de pozitivaj evoluoj pacigaj, eĉ se la publiko preferas aŭdi pri perfortigoj kaj krimoj. Por kontentigi tiun publikon la gazetoj, radio- kaj televid-elsendejoj ĉefe raportas pri politikaj disputoj, murdoj, militoj kaj katastrofoj. Tio gvidas nian atenton ne al la studema kaj laborema junularo, sed al la drogemuloj, ne al la landoj bone funkciantaj, al la entreprenoj sukcesantaj, sed al la ŝtatoj kun sociaj konfliktoj kaj al la industrioj, kiuj bankrotas.

A.- Por reveni al la Gola Konflikto ni rimarku, ke verŝajne la kurda kaj la palestina problemoj trovas kontentigan solvon, nur kiam la loĝantoj de la koncernaj regionoj alvenos al supernaciaj perceptoj de la problemoj. Nur kiam ili kapablos pensi plurale. En Turkio: ni kaj la kurdoj, en Irano: ni kaj la kurdoj, en Irako: ni kaj la kurdoj, en Kurdujo: ni kaj la turkoj,

irakanoj kaj irananoj. Tiam ili malkovros, ke plur-etneco estas riĉeco kaj ili havos la deziron kunkonstrui ŝtataron. Svislando havis la privilegion malkovri, ke plurlingveco estas riĉeco.

Cl.- Responde al nia rusa korespondanto Igorj KRIVĈONOK en Leningrado, Sovetio, ni provis komprenigi, kial en niaj elsendoj ni ne ripetos, kion oni povus aŭdi en nacilingvaj elsendoj. La esperantistoj kuraĝe kultivu super-etnan sintenon, pensante plurale, eĉ kiam la aliaj samlandanoj en sia plimulto reagis kiel naciistoj pensantaj nur ununombre. Pere de Esperanto ni kultivu homaranan sintenon.

A.- Kaj konatiĝo kun la ĉefverkoj kaj temoj de la originala literaturo, kiun produktis Esperanto, estas laŭ ni unu el la plej taŭgaj manieroj kreskigi en ni antidoton al la naciaj ŝovisnismoj, kiuj daŭre minacas invadi nian personecon. Edmond PRIVAT konkludis en 1910 sian paroladon titolitan "Pri Esperanta Literaturo" per frazo, kiun ni pensas utile rememorigi:

Cl.- "Ankaŭ per sia literaturo, ĉiam nur konstruante kaj nenion detruante, Esperanto daŭras esti unu el la plej grandaj, unu el la plej rektaj vojoj por krei, inter la homoj, pli da bono, pli da belo kaj pli da lumo saniga."

A.- La venontan semajnon ni daŭrigos nian respondon al la ricevitaĵoj korespondantoj. Nome de Svisa Radio Internacia salutas Claude kaj Andrée GACOND: Ĝis la reaŭdo!

Kopirajto © Claude GACOND, www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), junio 2012